Profesoro Masuo Hukuhara naskiĝis la 24-an de decembro 1905 en Tokio. Fininte la lernadon en la Kvara Mezlernejo de la Gubernio Tokio kaj poste en la Unua Nacia Kolegio, li eniris en la Universitaton de Tokio, de kiu li gradiĝis en la jaro 1929. Post la gradiĝo li eniris en la Postgradiĝan Lernejon de la sama universitato kaj daŭrigis la studadon de la teorio de diferencialaj ekvacioj sub la gvido de Prof. Yosie, jam mortinta, kaj startis al la kariero kiel matematikisto.

En la jaro 1931 li estis invitita de la Universitato de Hokkaido kiel docento. Tie li estis promociita 1932 al asistoprofesoro, ĉe kiu posteno li restis ĝis la jaro 1937.

En marto 1937 la matematikisto transiĝis al la Fakultato de Inĝenieraj Sciencoj de la Universitato de Kyusyu. Li fariĝis en aprilo 1939 profesoro de ĝia nove fondita Fakultato de Sciencoj kaj faris klopodojn por la instalado de tiu fakultato. Intertempe li ricevis de la Universitato de Tokio 1938 la titolon de doktoro de sciencoj per studoj de la teorio de ordinaraj diferencialaj ekvacioj.

En julio 1948 Prof. Hukuhara estis invitita de la Universitato de Tokio, kies studento li iam estis, kaj sidis sur la katedro tie ĝis marto 1966, kiam li eksiĝis de la profesoreco pro la aĝlimo. En majo de la sama jaro la universitato donis al li la titolon de Emerita Profesoro.

Intertempe la Japana Akademio honoris lin 1961 per donaco de la Akademia Premio por liaj meritaj laboroj pri la teorio de diferencialaj ekvacioj. Laŭ invitoj de alilandaj sciencaj rondoj li vizitis Eŭropon tri fojojn, en la jaroj 1956, 1959 kaj 1962. Vizitante la landojn Francujo, Italujo, Rumanujo, Svedujo, Hungarujo, Ĉeĥoslovakujo, Jugoslovujo kaj

Pollando, li donis tie multajn lekciojn kaj prelegojn.

Li estis elektita en la jaroj 1963 kaj 1966 kiel membro de la Japana Nacia Konsilio pri Esploroj por du sinsekvaj periodoj kaj nun li estas ĝia membro.

Kiam la Instituto por Esploroj de Matematikaj Sciencoj estis fondita en Kioto 1963, Prof. Hukuhara estis instalita la unua direktoro de la Instituto estante daŭre profesoro de la Universitato de Tokio kaj restas ĝis nun ĉe tiu posteno.

Li faris grandajn kontribuojn al la kreskado de la Japana Matematika Societo kaj estis ĝia prezidanto dum kvar periodoj, 1951, 1954, 1955 kaj 1960. Kaj li klopodis ankaŭ por kreskigo de ĝia suborganizo la Divizio de Diferencialaj Ekvacioj kaj fondis kiel gian organon, 1958, nian revuon, "Funkcialaj Ekvacioj (Serio Internacia)" kun helpoj de Prof-oj Mitio Nagumo kaj Tokui Satō.

Prof. Hukuhara funkcias ankaŭ kiel redaktoro de la influaj fakaj gazetoj de Japanujo, "Journal of the Mathematical Society of Japan", "Japanese Journal of Mathematics" kaj "Funkcialaj Ekvacioj (Serio Internacia)".